PILO-PRESS
Internacia
Informservo
N-ro 14/77 - 2 aprilo 1977
Aperas ĉiusemajne

Eŭropa Esperanto-Revuo

Kiel duobla numero en amplekso de 20 paĝoj eliras en ĉi-tiuj tagoj nova numero de EER 7-8/1976. I.a. la revuo entenas 5-paĝan rubrikon "Esperanto en la radio"

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

## Tutpollanda konferenco pri informado

Varsovio (pp) - La Informa Servo de Pola Esperanto-Asocio (PEA) sciigis al Pilo-Press, ke la 2-an kaj 3-an de aprilo 1977 okazas en Gdansko tutpollanda konferenco dediĉita al la informado pri Esperanto. La konferencon, organizitan de la Komisiono pri Informado kaj Eldonado de PEA, partoprenas ĉ. 120 personoj el diversaj lokoj de Pollando. La ĉeftemo estas: "Formoj kaj tekniko de la Esperanto-informado sur la ŝtupo de la rondo de PEA". Temas pri la ellaborado de gvidprincipoj kiuj helpos al la lokaj informantoj kaj pliefikigos la informadon konforme al la aktualaj bezonoj. Similan konferencon dediĉitan al la informado sur la tutlanda ŝtupo oni planas organizi ĉi-aŭtune.

La konferenco en Gdansko konsistas el la prelego de Tomas Bedyna pri "La aplikado de la principoj de prakseologio en la Esperanto-agado". Oni pridiskutas informmaterialojn, kiujn oni prezentas en speciala ekspozicio. Andrzej Pettyn gvidas "Borson de inform-ideoj", dum kiu oni interŝanĝas spertojn kaj ideojn. Alia interesa iniciato estas ekspozicioj de fotoj (formato 13 je 18 cm), kiuj bilde propagandas Esperanton. La unua fotoserio jam aperis kaj estas dediĉita al la nunjara solenado de la Semajno de Internacia Amikeco en Pollando kaj en Hungario.

Redaktoro Andrzej Pettyn, kiu kiel vicprezidanto de PEA denove gvidas la informadon en Pollando, prelegas kadre de la gdanska konferenco pri la temo "Konkursoj kaj kvizoj en la informado pri Esperanto". Valoras aldoni, ke la novaj gvidprincipoj pri informado sur la ŝtupo de la rondo de PEA, kiujn oni ellaboros rezulte de la konferenco en Gdansko kunlige kun tiuj de Fróstavallen, plivigligos la informadon en Pollando. Oni devas substreki, ke la Komisiono pri Informado kaj Eldonado de PEA laboras tre vigle kaj espereble rezultigos interesajn fruktojn.

## Semajnfina kurso

Oberursel (pp) - En Oberursel apud Frankfurt/M, F R Germanio, kunvenis la 25-an ĝis 27-a de marto aro da esperantistoj por en semajnfina kurso perfektiĝi en la Internacia Lingvo.

Iniciatanto de la seminario estis Manfred Führer, fakestro "Esperanto" de la Naturamikoj. Oni instruis en pluraj, ne tro grandaj grupoj. Tiaj kursoj okazas regule kaj estas ege ŝatataj kaj bone frekventataj de esperantistoj inter 17 ĝis 70 jaroj.

Kadre de la semajnfina seminario oni ankaŭ aŭskultis elsendojn de Radio Varsovio kaj pridiskutis ilin. Aŭskultinte eltiraĵon el la sonrevuo "La semajno en Pollando", la partoprenantoj sendis al Radio Varsovio jenan salutleteron: "Bedaŭrinde la vetero ĉe ni ne estas tiel bela kiel en Pollando, dum ni aŭskultis vian elsendon dimanĉ-matene, la 27-an de marto 1977. Tamen ankaŭ en semajnfina kurso oni diligente laboras, ne ekstere sur benkoj, sed interne en la domo por lerni la Internacian Lingvon kaj perfektiĝi almenaŭ tiom, ke eblas aŭskulti regule la elsendojn de Radio Varsovio."

E-Ritt.

## Lastmomente

La 28-an de marto 1977 forpasis en la aĝo de 83 jaroj unu el la plej elstaraj germanaj esperantistoj, JOSEPH F. BERGER, Köln, honora membro de Germana Esperanto-Asocio. La entombigo okazis la 1-an de aprilo. Al la edzino kaj filoj ni sendas niajn varmajn kunsentojn! Nekrologo sekvos en la venonta numero!

## Komuna kulturvespero de la vienaj esperantistoj kun la Societo "Österreich - Deutsche Demokratische Republik"

Wien (pp) - Tre proksime al la preskaŭ luksaj, tamen jam familiaraj al ni salonoj de la Pola Kulturinstituto kaj same kiel tiu piede de la altaĵo sur kiu staras la rave gotika preĝejo de Sankta Maria Surborda, situas ankaŭ la klubejo de la Asocio "Aŭstrio - Germana Demokrata Respubliko", Salzgries 17. Ĝi estas malpli granda, malpli luksa, tamen distinge ekipita kaj vere komforta. En ĝia intima atmosfero kunvenis en la sabata vespero de la 19-a de marto 85 homoj, la plejmulto esperantistoj, sed ankaŭ kontentiga nombro da neesperantistaj gastoj - eĉ el Belgio kaj Svedio.

Temis pri kulturvespero komune aranĝita de la "Aŭstria Esperantista Federacio" kaj "Societo por Internacia Kompreniĝo -Esperanto-amikoj" kun la "Asocio Aŭstrio - Germana Demokrata Respubliko". Alcelita estis informado pri la ekonomia, kultura - speciale Esperantista - vivo en la Germana Demokrata Respubklio por ĉiuj, kaj atentigo kaj informado pri la Internacia Lingvo por la neesperantistaj membroj de la gastiganta asocio. Tiun celon oni sendube atingis, ne nur dank' al la instruaj kolorsonfilmoj - unu el ili esperantlingva - sed antaŭ ĉio pro la alparolaj vortoj de d-ro Ludwig Berg, la afabla funkciulo de la asocio, kaj pro la realisma prelego de s-ro Franz Haiderer pri la aktivado de la esperantistoj en la Germana Demokrta Respubliko. Ilia situacio estas parte enviinda, ĉar ili ĝuas, kiel sekcio de la tiel nomata "Kulturbund", t.e. " Kultura Ligo", la avantaĝojn de oficiala ŝtata institucio. La ŝtato pagas la eldonon de rimarkinde praktikaj lernolibroj, vortaroj kaj literaturaĵoj. S-ro Haiderer montris specimenajn ekzemplerojn.

Sekvis, ekster la oficiala programo kaj por la jubileulo mem neatendita honorigo de la konata, multmerita viena Esperanto-pioniro, s-ro Hugo Braun, okaze de lia 80-a naskiĝtago, feste reliefigita jam du tagojn antaŭe en la "Esperanto-Informoj" de Radio Vieno.

Fine oni kunestadis proksimume duonhoron sin refreŝigante ĉe la bufedo, abunde kaj zorge pretigita de la dommastrino, s-ino Frederike Domes kaj ŝia filo, al kiuj s-ro Emil Vokal, la aktivega iniciatinto kaj organizinto, esprimis la sinceran dankon de ĉiuj, kiuj partoprenis en tiu nova, interamikiga kontaktaranĝo. Beckmann

Laŭ ORF, Esperanto-elsendoj.

## Komento de Pilo-Press

Ŝajnas, ke s-ro Franz Haiderer iomete tro optimisme kaj entuziasme prijuĝas la situacion de Esperanto en Germana Demokrata Respubliko (GDR). La frazo "La ŝtato pagas la eldonon de rimarkinde praktikaj lernolibroj, vortaroj kaj literaturaĵoj" povus konduki al la konkludo, ke la ŝtato GDR donacas Esperanto-lernolibrojn ktp. al siaj ŝtatanoj. Ĝis nun mi aŭdis pri neniu ŝtato kiu tion faris. Ankaŭ GDR ne faras tion. La eldonado de lernolibroj, vortaroj kaj Esperanto-literaturo ankaŭ en GDR estas pure ekonomia afero. Kion faras la ŝtato, tio estas iu ŝtata instanco donas la permeson pri eldonado. Kaj tiam iu licenzita eldonejo faras la kutimajn negocajn procedojn kaj la libroj estas vendataj al enlandaj kaj pli prefere al eksterlandaj klientoj - pro devizoj -. Do ankaŭ en GDR oni devas aĉeti lernolibron se oni volas lerni Esperanton. Tamen ankaŭ tie - kiel en multaj aliaj landoj - regas granda manko je lernolibroj kaj vortaroj por Esperanto. La vortaroj de Krause aperis ĉe VEB Verlag Enzyklopädie, Leipzig, kaj la romanon "Nuda inter lupoj" eldonis Editions Leipzig.

************************

Pilo-Press, ĉiu-semajna informservo , jara abono 30,- GM

Pagebla al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851

PILO-PRESS respondas

## Pri la "Tri-Groŝa Romano"

S-ro Gerhard Kunze, Freudenstadt skribas: " En la lasta END mi legis, ke la Bleicher-Verlag intencas eldoni en Esperanto la Tri-Groŝ-Romanon. Certe vi scias, ke en GDR oni ĉi-printempe atendas la saman verkon. (Aŭ ĉu temas pri alia?) Mia atentigo okazas nur pro zorgo, ke la limigita merkato ne povos"digesti" la 2 eldonojn..."

Respondo: Laŭ nia informiĝo la "Tri-Groŝa Romano" de Bertold Brecht en la traduko de d-ro Karl Schulze, Berlin (Orienta),aperos en kooperado inter Edition, Leipzig, GDR, kaj Bleicher-Verlag, F R Germanio. Edition, Leipzig, priservos la Esperanto-libromerkaton en socialismaj landoj, kaj Bleicher-Verlag tiun en okcidentaj landoj. Ŝajnas al ni, ke tio estas imitinda laborodivido inter du ne-esperantistaj eldonejoj.

**********************

## Pri atomenergio

La semajna komentario de la Esperanto-Elsendoj ORF Wien de la 26/27-a de marto temis pri aktuala temo, nome pri la atomenergio. Pro la aktualeco ni publikigas la komentarion de d-ro Alfred Macher komplete:

"En ĉiuj industrilandoj, do ankaŭ en Aŭstrio, la energio pli kaj pli malabundas. Tial plimultiĝas la atom-energiejoj, kvankam eĉ la specialistoj tre diversopinias pri ilia danĝereco. Malgraŭ la fakto, ke en la komunismaj ŝtatoj ekzistas jam multo da atom-energiejoj, montriĝis, ke la fortegajn demonstraciojn de la atom-kontraŭuloj partoprenis precipe aktivegaj, perfortemaj jun-komunistoj, kiuj batalas malpli kontraŭ la atom-energiejoj ol kontraŭ la establita socia ordo, alcelante anarkion.

En Aŭstrio, ĉar eĉ niaj grandegaj hidro-elektrejoj ne plu sufiĉas, oni nun ĝustatempe konstruis atom-energiejon 50 km okcidente de Vieno. Ĝi ne jam funkcias, ĉar la aŭtoritatoj postulas pli da sekurigoj por la ĉirkaŭloĝantaro.

Tamen la kvazaŭ profesiaj tumultemuloj - de la ekstrema dekstro same kiel de la ekstrema maldekstro - protestis ankaŭ ĉe ni. Sed temis pri nur malgrandaj aretoj. Eĉ en Vieno kunmarŝis maksimume 3 000 personoj - plejparte studentoj. Kaj ĉio pasis sen minacoj, sen batoj! Ĝojigite ni konstatas, ke en Aŭstrio eĉ la ekstremaj aktivuloj ne estas tiel ekstremaj kiel en aliaj landoj.

Sed, kredeble, nek radikalismo nekpacemaj demonstracioj decidos pri la plukonstruado aŭ malfunkciigo de atom-energiejoj. Ĉu bezoniĝos elektro aŭ ĉu ne, t i o decidos. La energio el petrolo estas ne nur tro multekosta - ĝi fine elĉerpiĝos! Restas sole la espero, ke la tiel nomata "neta kernfendo" liberigos la homaron, teknike kaj finance, de ĉiuj energi-zorgoj. "

++++++++++++++++++++++++

## Internaciaj studsemajnoj en Vääsky

Vääsky (pp) - De la 9-a ĝis la 17-a de julio 1977 okazos internaciaj studsemajnoj. Antaŭe estos aranĝataj studsemajnoj en Yli-Tornio de la 13-a ĝis la 18-a de junio 1977. Informojn donas: Internacia Studcentro, SF-17300 Vääsky, Finnlando. La Internacia Studcentro en Vääsky aranĝas studsemajnojn, kulturajn okazaĵojn, lingvokursojn, edukajn kursojn, studrondojn, ekzamenojn, studekskursojn ktp.

De la 11-a ĝis la 14-a de aŭgusto okazos studekskurso al Novgorodo.

En ambaŭ studsemajnoj estas antaŭviditaj ekskursoj, saŭno kaj fumbanejo.

Hamburger Abendblatt

Hamburger Abendblatt

Freitag, 25. März 1977

# Esperanto-Verein hat ein Domizil

In Hamburg gibt's schätzungsweise 500 Menschen, die Esperanto, eine weltweit verbreitete Kunstsprache, beherrschen. Knapp 200 davon sind im Esperanto-Verein Hamburg organisiert. Seit gestern haben die „Esperantisten" ein eigenes Domizil: Ein ehemaliges Kantinengebäude an der Vehrenkampstraße in Langenfelde wurde zum Treffpunkt mit Bibliothek und Vortragsraum umgestaltet.

Jeden Donnerstag wollen sich die Esperantisten dort um 19 Uhr treffen. Allein wollen sie nicht bleiben: In ihrem neuen Haus hoffen sie auf neue Besucher. Es wurden deshalb extra neue Sprachkurse eingerichtet.

Ob das Werben um Mitglieder Erfolg haben wird, wird sich zeigen. Auf jeden Fall gibt's dafür gute Wünsche aus der Bürgerschaft. Die SPD-Abgeordnete Dr. Ingrid Seeler schrieb nämlich: „Nome de la Socialdemocrata Frakcio de la Hamburga Urb- kaj Landparlamento ..." „Im Namen der SPD-Fraktion der Bürgerschaft ..." sandte sie alles Gute. Dr. Seeler ist eine von Hamburgs Esperantisten. mic-

## Klubeja inaŭguro en Hamburg

Hamburg (pp) - Por hamburgaj esperantistoj la 24-a de marto 1977 certe ĉiam restos en ilia memoro, ĉar tiam okazis la sukcesplena inaŭguro de la klubejo de la Hamburga Esperanto-Societo.

La inaŭguro ne estis interna sed publika aranĝaĵo. La klubejon ornamis granda Esperanto-ekspozicio kun libroj, mapo pri la delegita reto de UEA, urbaj varbiloj en Esperanto ktp. Multaj ĵurnalistoj kaj homoj loĝantaj proksime al la klubejo estis invititaj al tiu inaŭguro.

Kiel unuaj gastoj venis reporteroj de la Dua Germana Televido "ZDF". Ili produktis filmon pri la inaŭguro, kiun oni povos vidi post pasko en la elsendaĵo "Drehscheibe". Krome ĉeestis ĵurnalistoj de "dpa" (Germana Presagentejo) kaj Hamburger Abendblatt. Jam la postan tagon aperis artikolo pri la nova klubejo en ĉi tiu gazeto (vidu la apudan eltranĉaĵon!), kaj dum la inaŭgura posttagmezo la klubanoj kaj iliaj gastoj jam povis aŭskulti al triminuta pozitiva komentario pri esperantistoj en Hamburgo. Ĝi estis elsendita de nordgermana radiofonio.

El la ĉirkaŭ 80 ĉeestantoj restis 54 esperantistoj por partopreni la klubvesperon, inter ili gastoj el Soltau kaj Kopennago (familio Kehlet). Salutvortoj de la prezidanto de UEA, prof. Tonkin kaj de s-ino d-ro Seeler estis laŭtlegitaj.
Sekvis ege interesa 150-minuta prelego de s-ino Haudebine pri Hindujo kun lumbildoj kaj ekspozicio pri la hindia kulturo.
La lastaj dek ĉeestantoj ankoraŭ restis ĝis post noktomezo. Thomas Bormann

## Esperanto en Radio

Varsovio. "Aŭdi Chopin en Varsovio, tio estas same kiel vidi la Bolŝoj-Baledon en Moskvo aŭ la Operon en Milano...". Per tiuj vortoj s-rino Elisabeth Ritterpach skizis siajn impresojn antaŭ la gastmikrofono de la Esperanto-Redakcio de Pola Radio pri Varsovio, lastan dimanĉon kaj lundon dum la Esperanto-Ekspreso. Ŝiaedzo, Gernot Ritterspach pro fervoja konferenco en Varsovio, devis vojaĝi al la pola ĉefurbo kaj je tiu okazo li invitis sian edzinon vojaĝi kun li. Kaj tiele ambaŭ povis konatiĝi kun la lulilo de Esperanto kaj kontakti ankaŭ la Esperanto-redakcion. El la kulturaj felietonoj ni menciu tiun pri la "Eŭropa banko de kulturaj donitaĵoj".

IBRA-Radio. Tiu elsendo denove estis bonege aŭdebla. Parolis s-ro Carlén pri la "estonta regno de Dio".

Zagrebo. En sia elsendo de la 25-a de marto Radio Zagreb respondis al siaj korespondantoj kaj priparolis kelkajn ricevitajn periodaĵojn. Oni ankaŭ menciis Pilo-Press, de kiu laŭ la vortoj de Emiljia Lapenna la Esperanto-redakcion atingis "kelkaj ekzempleroj". Ŝajnas ke survoje al tiu stacio perdiĝas poŝtaĵoj, ĉar jam de jaroj ni sendas regule ĉiujn numerojn de PP. La stacio ĉiam estas bonege aŭdebla!

Svisa Kurtonda Radio. D-ro A. Baur daŭrigis sian serion pri la eklezioj en Svislando, ĉi-foje pri la diocezo Baselo.